Karl Vanselow,

Lia bildo

(Zamenhof-portreto kun verda stelo kaj florornamo)

Ne plu vivas Li sur nia tero,
Sed la bildon kun la stel-dekor'
Vidas ni kun ĝojo kaj fiero
Pri de nia lingvo la valor'.

Aŭdu de la voko la admonon:
Konatigu, samideanaro,
Lian tiel feliĉigan donon,
Agu ankaŭ vi laŭ Lia faro.

Zorgu, ke aŭdiĝu Esperanto
Ne nur en la amikara rondo,
Sed ke ĝi fariĝu ĝoj-donanto
Por la homoj en la tuta mondo.

Lian bildon kun la stel-ornamo
Kaj dekora memoriga flor'
Vidu ĝin, rigardu ĝin kun amo
Kaj retenu ĝin en via kor'.

Verkinto de tiu ĉi Esperanta poemo estas Karl Vanselow *(∗1877-03-20 – †1959-12-28).*

Arg-1055-2140 (2014-06-20 19:57:34)

Tiu ĉi originale verkita poemo troviĝas en la poem-libreto "Nia Lingvo Esperanto", eldonita mallonge post la jaro 1945 en la tiama usona sektoro de Berlino, de Karl Vanselow, dua serio, unua kajero. Pri Karl Vanselow vidu la retejojn `http://de.wikipedia.org/wiki/Karl_Vanselow` *kaj* `http://de.wikipedia.org/wiki/Karl_Vanselow`*, ankaŭ:* `http://vanselow.wikispaces.com/`*.*